

V-24128/4 (1923/24) LA

# PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO : PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kč 20.—, fremdlando: bonvaluta Kč 25.— (5 sv. fr.) malbonvaluta Kč 15.—  
(3 sv. fr.) Konto de la ĉekoficejo Praha n-ro 34.271.

ČESKOSLOVENSKÝM ESPERANTISTŮM ! AL ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTISTARO !

Po staeitj velcĭ duĥove rŭznŭch nŕo-  
dŭ usilovali marnĕ o zŕazraĉnŭj prostředek  
dorozumivacĭ, kterŭj mŕame dnes my, ŝastnŭj  
ŕŕacĭ Zamenhofovi. Ale přes velikĕ ŭspĕchy,  
jichŝ esperanto v poslednŭj letech i u nŕs  
dosŕhlo, je nutno pokračovati v ŭsilovnĕ  
propagaci, jeŝto se mravnŭj ideŕly uskuteĉ-  
nŭj vŝdy pomalu.

Pevnŕ nŕaŝe nadĕje ve zdar dŭla, od-  
danost k mravnŭmu řŕadu lidstva zaloŝenĕ-  
mu na přirozenĕm styku pomocĭ neutrŕlnŭj-  
ho jazyka a vŕra ve vŭchovnou a tvřřcĭ  
schopnost esperantismu vedou nŕs k tomu,  
ŝe

seskupeni v jeden pracovnŭj kruh

chceme v naŝich zemŭch nadŕle krŕĉeti za  
tŭmto ideŕlem k vŝŝim metŕm a lepŝĭ kul-  
tuře lidstva.

Ĉasopis „Progreso“ po ŝest let vydŕ-  
vanŭj v Plzni, přechŕzĭ na nŕvrh plzeňskŭj  
přŕtel tŭmto ĉislem do Prahy, aby se za  
novĕ redakce stal pevnou oporou tohoto  
naŝeho snaŝeni.

Přihlaŝujĭce se ku spoluprŕci zveme  
k ni vŝechny ĉeskoslovenskĕ esperantisty.

Vpřed pro dobrĕ jmĕno ĉeskĕ pŕŕce  
a za ideŕlem Komenskĕho a Zamenhofa !

V listopadu 1923.

Dum jarcentoj la grandaj spiritoj di-  
versnaciaj vane klopodis trovi miraklan ri-  
medon interkomprenigan, kiun nuntempe  
havas ni, feliĉaj disciploj de Zamenhof.  
Sed spite la grandaj sukcesoj, kiujn espe-  
ranto en la lastaj jaroj ankaŭ ĉe ni atingis,  
estas necese daŭrigi la insistan propagan-  
don, ĉar la moralaj idealoj ĉiam realiĝas  
malrapide.

Nia firma espero je la sukceso de la  
laboro, nia sindono al la morala ordo de  
l'homaro bazita sur la naturaj rilatoj per  
helpo de neŭtrala lingvo kaj nia kredo je  
la eduka kaj krea kapabloj de la esperan-  
tismo gvidas nin al tio ke

unuigitaj en unu labora rondo

ni en Ĉekoslovakio volas daŭre kaj firme  
marŝi al tiu ĉi idealo por atingi pli altajn  
celojn kaj pli bonan kulturon de la homaro.

La gazeto „Progreso“, eldonata dum  
ses jaroj en Plzeň, transiras per tiu ĉi nu-  
mero, laŭ la propono de niaj amikoj de  
Plzeň, al Praha por fariĝi, sub la nova red-  
aktantaro, firma apogilo de tiu ĉi nia celado.

Aliĝante al la kunlaborado ni invitas  
al ĝi ĉiujn ĉekoslovakajn esperantistojn.

Antaŭen pro la bona nomo de ĉeĥa  
laboro kaj por la idealo de Comenius kaj  
Zamenhof !

En novembro 1923.

Dr. Alexander S. Batĕk, Břevnov. - Dr. Josef Barviř, Brno. - Jan Bastl, Sl. Ostrava. - Ing. Leopold Berger, Moravany. - Ing. Fr. Bĭna, Jaromĕř. - H. K. Bouŝka, Praha. - V. Cimr, Praha. - V. Ĉŕnskŭj, Praha. - Th. R. Ĉejka, Bystřice p. H. - L. Dandovŕ, Ŗiŝkov. - Jan Doleŝal, Pardubice. - Dr. V. Drtina, Beroun. - Jar. Drvota, Domaŝlice. - Red. J. Eiselt, Praha. - Dr. Jos. Fousek, Přelouĉ. - Prof. Rud. Fridrich, Krŕl. Pole. - O. Ginz, Praha. - Fr. Hŕjek, Nusle. - J. Pavlik, Plzeň. - M. Havrŕnkovŕ, Prostĕjov. - Prof. Dr. J. Heyer, Vĭdeň. - Kl. Hlavŕcovŕ, Smichov. - Rud. Hromada, Praha. - Ant. Janalĭkovŕ,

Bystřice p. H. - Jos. Jeřábek, Brno. - Prof. Em. Jireček, Tišnov. - Prof. Dr. H. Jokl, Videň. - Prof. Dr. St. Kamaryt, Bratislava. - Fr. Kavan, Plzeň. - B. Keyzlarová, Cervený Kostelec. - K. Koutek, Praha. - Dr. A. Kozáková. - V. Kraus, Praha. - Jos. Krumpholtz, Hlinsko. - Em. Kubásek, Plzeň. - M. Kubásková, Plzeň. - Ant. Kudela, Olomouc. - K. Loveček, Třebíč. - B. Ludvík, Kostelec n. č. 1. - K. Em. Macan, Praha. - J. Mastný, Olomouc. - Ing. B. Molnár, Praha. - M. Moudrá, Praha. - V. Němec, Brno. - Alb. Neuzil, Olomouc-Neředín. - Fr. Novák, Praha. - Ing. Rud. Novák, Plzeň. - Boh. Otava, Opava. - Jos. Paša, Malé Kunčice. - Major A. Paukert, Praha. - Jos. Pech, Plzeň. - Aug. Pitlík, Praha. - Prof. Fr. Pittner, Přerov. - K. Procházka, Praha. - Ant. Ráž, Beroun. - MUC. Lad. Riedl, Nová Paka. - Vlad. Röhling, Praha. - Jos. Řebíček, Olomouc. - Jar. Sitko, Brno. - O. Sklenčka, Hradec Králové. - Prof. St. Stejskal, Smíchov. - Jan Šembera, Brno. - Jos. Sídlo, Praha. - Al. Šíkl, Jičín. - Min. r. Mil. Schmidt, Vinohrady. - Al. Štěpán, Domašín. - Jul. Šupichová, Praha. - Jan Tauer, Opava. - B. Tittl, Plzeň. - Fr. Válka, Král. Pole. - B. Veselá, Jaroměř. - B. Vlčková, Praha. - Red. B. Weiner, Praha. - M. Weisskopf, Praha.



## LITERATURO

### GOLEM

(El „Staré pověsti české“ de Alois Jirásek.)

Dum la regado de Rudolfo II., en la komenco de 17<sup>a</sup> jarcento, vivis en Hebrea kvartalo en Praha rabeno Jehuda Löw ben Bezalel, viro tre instruita kaj sperta. Li estis altstatura kaj tial oni nomis lin „la granda rabbi“. Bonege li konis ne nur la talmudon kaj kabalon, sed ankaŭ matematikon kaj astronomion. Multaj sekretoj de la naturo misteraj por homoj estis al li konataj kaj li trafis tiajn agojn, ke la homoj admiris lian magian povon.

La famo pri li disvastiĝis malproksimen en la mondon kaj penetris eĉ supren en la kastelon de sankta Venceslao, al kortego de reĝo Rudolfo. Lia kortega astronomo Tycho de Brahe tre estimis la instruitan Jehuda Löw.

La plej granda miraklo estis Golem, lia servisto. La potenca rabeno mem kreis lin el argilo; poste li vivigis lin metinte en lian buŝon „ŝemon“.\*)

Golem laboris tiom, kiom du homoj. Li alservadis, alportadis akvon, hakadis lignon, balaadis kaj entute dirite li faradis ĉiujn maldelikatajn laborojn. Kaj sciu, li ne manĝis, ne trinkis kaj ne bezonis ripozon nek respiron. Sed ĉiufoje, kiam komenciĝis hebrea sabatfesto, vespere vendrede, kiam devis ĉesi ĉia laboro, la rabeno prenis la „ŝemon“ el lia buŝo; Golem subite rigidiĝis, ne movis sin kaj staris en angulo kiel figuro, sen viva argilo, kiu post la sabato tuj reviviĝis, apenaŭ la rabeno metis en lian buŝon la magian „ŝemon“.

\*) Ŝemo, hebree ŝem, karteto kun hebrea magia surskribo,

Sed unufoje Löw ben Bezalel ironte en malnovan sinagoton eksanktigi la sabatfeston, forgesis pri Golem kaj ne eligis la ŝemon el lia buŝo. Sed apenaŭ la rabeno estis enirinta en la preĝejon, apenaŭ li estis komencinta la psalmon, jam alkuris al li homoj el lia domo kaj el ĉirkaŭaĵo, ĉiuj timkonsternitaj, kaj kun teruro, interrompante unu la alian, ili anoncis kriante, kio okazas, kio okazis, ke Golem furiozas hejme, ke neniu kuraĝas proksimiĝi al li, ĉar li mortigus ĉiun.

La rabeno hezitis momenton; ekestis ja la sabatfesto, la psalmo komenciĝis jam. Ĉia laboro, ĉia, eĉ plej malgranda penado estis peko de post tiu momento. Li tamen ne findiris la psalmon, per kiu sanktiĝas la sabatfesto, do ankoraŭ ne venis la vera momento de festo. — Li levis sin kaj rapidis al sia domo. Ankoraŭ li ne ĝisiris kaj jam li aŭdis obtuzan bruon, barelsonantajn frapojn. Kiam li enpaŝis, la aliaj pro timo marŝis iom malantaŭ li, li ekvidis teruran detruitecon: disrapitan vazaron, pecigitajn tablojn, seĝojn, kestojn kaj benkojn, disĵetitajn librojn. Tie Golem jam estis fininta sian verkon de detruo. En tiu momento li „laboris“ en korto, kie kuŝis jam kokinoj, kokidoj, kato kaj hundo, ĉio mortigite, kaj kie li ĵus tiradis el tero tilion kun dika trunko. Li estis tute ruĝa, kaj nigraj bukloj flugis ĉirkaŭ lia frunto kaj vangoj, kiam li elradikigis la arbon kvazaŭ iun palison el barilo.

La rabeno iris rekte al li; li rigardis lin fikse kaj tenis manojn etenditajn al li. Golem ektemis, li malfermegis okulojn, kiam la majstro lin tuŝis, kaj rigardis mirkonsternite en liajn okulojn, kvazaŭ li estus enkatengita de lia potenca vidosento. Kaj en tiu momento rabbi etendis manon al liaj dentoj kaj per unu manmovo li elŝiris el lia buŝo la magian „ŝemon“.

Golem falis kvazaŭ iu sube estus frapinta lin. Subite li falis teren kaj kuŝis sen movkapablo jam nur kiel argila figuro, senviva materio.

Ĉirkaŭe ĉiuj Hebreoj junaj kaj maljunaj ĝoje ekkriis kaj plenaj de kuraĝo alpaŝis al falinta Golem, ridis kaj insultis lin. Sed la rabeno profunde elspirinte, elparolis eĉ ne unu vorton kaj paŝis denove al sinagogo, kie li je la lumo de lampoj denove komencis diri la psalmon kaj sanktigis la sabaton.

La sankteca sabata tago pasis, sed rabbi Löw ben Bezalel ne plu metis ŝemon en la buŝon de Golem... kaj tial Golem ne levis sin, ĝi restis argila figuro kaj estis transportita al subtegmento de la malnova sinagogo, kie ĝi disfalis peco post peco.

Trad. Rud. Fridrich.



VINCAS KRÉVÉ-MICKEVIČIUS

### SORTO DE L'PEGO\*)

Somero... Tagmezo...

Arbaro bruas, kvankam mi tute ne sentas venton: ĝi kuradas sur altaj vojetoj, sur pintoj de l'arboj.

Arbaro estas plena je mistero, profunda trankvileco kaj potenco kiel ekzistaĵo, kiu multe scias kaj komprenas.

Mi sidas sur ŝtupo kaj aŭskultas, metinte pafilon sur genuojn.

Kaj ŝajnas al mi, ke la arboj scias iun misteran sciaĵon, ke ili intermurmuretas, parolas unu al alia pri ĝi, balancante la pintojn, sed mi scias nenion, mi ne komprenas...

Kaj mi tiel malĝojas, ke mi ne komprenas, kion murmuris la arboj.

Kial ili estas tiel mallaŭtaj, trankvilaj?

Eble ili jam scias, kie loĝas feliĉo, eble ili jam komprenis, por kio vivas tiu-ĉi mondo, kia estas la senco de tiu-ĉi vivo — senco, kiun mia koro sentas, ke ĝi estas, sed la vojon al ĝi eltrovi ne povas, ne scias, kvankam tion deziras tiel dolore.

Kial estas la arboj tiel trankvilaj, tiel mallaŭtaj? Kian misteron kaŝas de mi la arbaro? Pri kio murmuris ĉi-tiuj belkreskaj arboj?

Mi ne scias, ne scias...

Kaj neniu diros al mi...

\*) El Litova almanako 1923.

Taŭkst — taŭkst, taŭkst — taŭkst!... sonas tra l'arbaro. Tio-ĉi estas la pego, kiu enkroĉiĝis en seklignon kaj ĉizas ĝin. Ĉizas tuta sindonita al unu deziro — plej rapide elĉizi la larvon, kiun per sia korpo elkreskigis, elnutris la arbo, belkreska pino.

Ĝi ankaŭ iam estis trankvila, ĝi ankaŭ intermurmuretis kun aliaj, balancante la altan pinton; nun ĝi mortis por ke vermo nutriĝu...

Ĉizas la pego kaj ĉizas, kaj ĝi ne pensas pri mi, kiu ĝin povas mortpafi, nek pri arbaro bruanta, nek pri tiuj altkreskaj balancantaj arboj, kiuj unu al alia diras sekreton.

Eble ĝi jam, longe aŭdis ĉiujn misterojn, kiujn arbaro bruas, kiujn la arboj rakontas... Eble ĝi jam scias, ke la arbaro por tio ekzistas, ke ĝi en tiu arbaro flugadu, ke la arboj por tio kreskas, ke ĝi havu sufiĉe da larvoj kaj insektoj...

Mi sidas sur ŝtupo metinte la pafilon sur genuojn kaj aŭskultas kiel bruas la arbaro, kiel la arboj bruetas, kaj la pego ĉizas kaj ĉizas... Hundeto alkuris, kuŝiĝis ĉe miaj piedoj kaj, elŝovinte la langon, spiradas...

Hundeto, hundeto! por kio ni vivas? Ĉu mi, por ke ci kuradu en arbaro kaj ne estu malsata, ĉu ci, por ke al mi ne estu tiel enue en l'arbaro vegeti...

Jen la pego ĉizas kaj ĉizas kaj entute nin ne evitas. Al ĝi estas tute sufiĉe, ke ekzistas la arbo, plena je larvoj. La arbo mortis, pereis, sed per tio gajnis la pego: tiu-ĉi arbo pereis, por nutri per sia korpo la larvojn, tiuj ĉi larvoj kreskas, por ke la pego ne estu malsata...

Ej, pego, atentu, ke mi cin ne demandu, por kio ci vivas, kial ci estas feliĉa? Ej, cin gardu, ke mi ne deziru ekkoni, kion mi tiel dolore volas scii, ne intencu eltrovi tion, kion mi tiel labore serĉas. — Ej, pego, cin gardu!...

Ne evitas min la pego. Nur ĉizas kaj ĉizas... Eble ĝi jam sentas malproksime la larvon, jam ĝin persekutas...

Kik — kik — krias la pego. Ĝi tiel ĝojas, ke ĝia deziro efektiviĝis, ke larvo jam estas en ĝia beko. Kik-kik... Ej, pego, ĉu ci estos feliĉa kaptinte la larvon, ĉian deziron plenuminte, kaj mi, estro de ĉiuj kreaĵoj... Eĥ, pego!...

Mi sublevis pafilon kaj celis... Ekbruis l'arbaro kaj l'arboj ekstremis... Defalis kaj kvazaŭ mem ne sciis, kio ĉi-tie okazis al ĝi.

Turniĝis sur unu loko, kriis, saltis kaj ankoraŭ ne povis kompreni, ke ĝi jam estas mortpafita, ke jam ne por ĝi verdiĝas l'arbaro, ne por ĝi jam pereas la arboj belkreskaj, subhakitaj per larvoj, ne, ne por ĝi...

Malĝoje, ho, kiel malĝoje...  
Premante, domaĝe...

Jen la tago estas varma kaj la suno brile lumas kaj la arbaro estas trankvila kaj paca, kiel antaŭe, kaj la arboj intermurmuretas, kiel antaŭe, kaj neniu observas, neniu rigardas ke tie-ĉi mortas vivaĵo...

Pereas la mondo, kiu vivis en ĝi...

Kaj tiel ĉiam kaj ĉie...

La pego ankoraŭ rerigardadis, saltadis, rampis sub arbitaĵojn. Alkuris la hundo, ekkaptis ĝin je la kapo kaj nur flugilojn ekskuis la pego...

Manĝu, hundeto, manĝu la pegon, se bongusta ĝi estas por ci.

Nun mi scias por kio la arbaro bruadas, pro kio en ĝi sensukiĝas la arboj altkreskaj, subtrancitaj per larvoj...

Nun mi scias por kio vivis kaj por kio pereis la pego...

Nun mi komprenas, por kio mi vivas, por kio suferas, por kio mi faras la bonon kaj krimon...

Por kio mi pereigis unu vivaĵon, kiu vivi deziris kaj rajton por tio-ĉi havis...

Mi scias, por ke mi mem vivu, kian fabelon rakontas la arboj, pri kia mistero murmuris altkreskaj kaj unu murmuretas al alia.

Ili murmuris, ke mi, la homo, sinjoro de l'mondo, inter agloj la aglo, vivas por tio, ke la hundo ne malsatu...

Ili murmuretas, ke mi sterkigos per mia korpo la teron, sur kiu elkreskos bela tremolo, kaj en tiu tremolo troviĝos malgranda larveto...

Esperantigis J. Koch.



MAXIM GORKI:

Abychom dosáhli vítězství kultury vydali jsme se ze všech svých duševních sil, obětovali jsme svou vůli, svůj život. Kdo může popřít, že taková společná řeč, jíž by mluvili všichni lidé, dala by mocnou vzpruhu kulturnímu vývoji? Jest tudíž nutno doznati, že má každý se snažiti o rozšíření esperanta a to snažiti se vši silou.

(—ch.)



## EL SCIENCO



Dr. STAN. KAMARYT:

### PRI LA ELEKTRONOJ

Siajn plej grandajn venkojn akiris la atoma imago de la materio, dum ĝi estis hipotezo. Nur kiam ĝi sukcese klarigis tre subtilajn diferencojn inter tre diversaj kemiaj reakcioj, oni sukcesis en jaroj 1900—1920 mezuri la kvantecon de la atomoj kun tiel surpriza precizeco, ke rezulto de 13 diversaj metodoj koincidis en nombro  $1.47 \times 10^{-24}$  gramoj por hidrogenatomo, la plej malmultepeza el ĉiuj atomoj. Tio estas unu kaj duono de unu kvadrilionono. Per tio estis ebligite, ke la homo povas kalkuli atomojn sciante ilian pezon kun la sama precizeco kaj kredindeco kiel pezojn de la tero, suno kaj de la aliaj ĉielaj korpoj. Per tio estis pruvite, ke la atomoj kaj molekuloj, la plej malgrandaj eroj de la materio, kiuj ĝis tiam estis sole supozataj, ne estas aĵoj hipotezataj sed reale ekzistantaj. Ilia ekzisto estas tiom certa, kiom certa estas ekzisto de la luno, tero, suno kiel globo de konataj dimensioj.

Sed jam dum finas tiuj ĉi esploroj, novaj laboroj komenciĝas, kiuj celas trovi la strukturon de interno de la atomo. La fenomenoj observataj ĉe radiumo pri ĝia radiado, pri inerta gaso el ĝi eliganta, pri ĝia ŝanĝo je aliaj elementoj, aktinio, radio-plumbo, plumbo, devigis starigi por klarigo de tiuj neatenditaj faktoj novan hipotezon. Tial Rutherford kaj Soddy ellaboris hipotezon pri elektronoj.

Elektronoj estas elementaj kvantoj elektraj, el kiuj konsistas atomoj. Pro sia elektra karaktero ili estas duspecaj: negativaj nomataj ĉiam elektronoj, kaj pozitivaj, ne posedantaj ĝis nun fiksitajn nomojn; kelkfoje oni nomas ilin „pozitivaj elektronoj“. Sed ni preferu el diversaj aliaj nomiĝoj vorton protonoj. Kvantecon de tiuj ĉi partetoj estas eksterordinare malgranda eĉ kompare kun absoluta pezo de hidrogenatomo. Ĝi estis kalkulita el devojiĝo de katodaj radioj per elektra kaj magnetaj kampoj kaj trovita proksimume egala al unu dumilono de hidrogenatomo. Sed tiu ĉi pezo, laŭ mezuradoj pri rapideco de katodaj radioj kaj de proporcio de elektra ŝanĝo kaj

materio, pligrandiĝas kun rapideco de la radioj. El tio oni estas devigata konkludi, ke pezo de la elektrono ne estas konsekvenco de ĝia materio, sed de rezisto de elektraj kampoj elektrona kaj akcela; alie dirite: elektrono, kiu estas la plej fundamenta ero de la materio, ne estas materiero, sed elektra ero. Pro tio oni povus koncepti la materion kiel aperon elektrodinamikan.

Per helpo de tia ĉi ideo de elektrono sukcesis N. Bohr klarigi multajn kvalitojn de kemiaj elementoj per imagoj de atomoj tiel detale kunmetita, ke oni ofte rajte parolas pri vera bildaĵo de atomo. Laŭ ĝi atomo de ĉiu elemento konsistas el kerno kunmetita el proksimume 2000 protonoj kaj elektronoj, kiuj estante tro apudigitaj neŭtraligas sin reciproke. Sed en ĉiu kerno superestas iom da protonoj (diversa malgranda nombro, ĉe ĉiu elemento alia), kiuj donas al ĝi elektro-pozitivan karakteron. Tiu ĉi elektro-pozitiveco estas neŭtraligata per (negativaj) elektronoj, kiuj cirkulas ĉirkaŭ la kerno per tioma rapideco, ke la centrifuga forto ekvilibras altiron de la pozitiva ŝarĝo kerna. La vojoj de elektronoj estas cirklaĵoj aŭ elipsaj, kaj la tuta atoma sistemo ne estas nesimila al suna planeda sistemo; sole la nombro de elektronoj estas pli granda ol la planeda ĉirkaŭ nia suno. Ĉe hidrogeno, la plej malmultepeza elemento, cirkulas ĉirkaŭ la kerno sole unu elektrono, ĉe helio du, ĉe litio tri, ĉe berilio kvar k. t. p., ĵupli peza la elemento des pli multaj elektronoj cirkulas ĉirkaŭ la kerno sur ciklaĵoj aŭ elipsaj vojoj ĝis ĉe la uranio, la plej multepeza, estas ilia nombro 92. Tio estas ankaŭ nombro de ĉiuj ekzistebaj kemiaj elementaj. Ĝis nun estas trovitaj 87 do restas jam sole 5 trovotaj elementoj.

Tiu ĉi teorio pri la atomkonstruo bone klarigas diversajn regulecojn de kemiaj kaj fizikaj fenomenoj, precipe tiuj pri radiumo kaj radiaktivaj substancoj kaj pri elektra kondukiveco.



SE LA GAZETO PLAĈAS AL VI,  
NE HEZITU SENDI  
VIAN ABONON

[Vidu p. 12. „Al la legantoj“.]

## NOVA EŬROPO

### LATVUJO

(Ĉeĥe Lotyšsko, france Lettonie, germane Lettland.)

Ekzistas malmultaj nacioj, kies sortoj kaj suferoj povus veki tiom da simpatioj ĉe malgrandaj nacioj, kiel la Latvoj. Jam Germano Gottlieb Merkel, homo justa, plendis en la unua duono de la pasinta centjaro antaŭ la tuta Eŭropo kontraŭ siajn samnacionoj, kruelaj malamikoj de Latvoj, priskribante en la libro „Die Letten“ la agojn de perforto, kiun faris la baltogermanaj nobeloj kontraŭ Latvoj, kaj li riproĉas, ke ili dum ses jarcentoj subpremadis ĉi tiun nacion kaj baris ĝian spiritan evoluon. Kaj alia Germano Otto von Mirbach, parolante pri iliaj luktoj porliberacaj en la 14 centjaro, diras ke neniu nacio sukcesis defendi sian liberecon kun tiom da energio kaj per rimedoj tiel nericaĵaj. Riga, ilia ĉefurbo, vidis kiel siajn gubernestrojn Polojn, Svedojn, Rusojn, Polojn kaj ree Rusojn.

Tre malfacile estis konvinki la regnestrojn pri la rajto al memdestino. Eĉ Miljukov, rusa ministro, rifuzis doni aŭtonomion al Latvujo dirante ke Samoĵedoj ankaŭ kuraĝus postuli ĝin. Dolore li ofendis ĉi tiun nacion.

Ĉi tiu ŝtato, naskiĝinta el la estinta Rusujo, havas 66 milojn da km<sup>2</sup> (duono de ĉeĥoslovaka respubliko, duoble pli granda ol Nederlando). Krom Riga ekzistas du havenoj Liepaja (Libaŭ) kaj Wentspils (Windaŭ). Gravaj estas la urboj Jelgava (Mitaŭ) kaj Daŭgaŭpils (Dvinsk). La latva marbordo estas 494 km longa.

La juna respubliko enhavas 1,730.000 da loĝantoj (26 sur km<sup>2</sup>). 80 procentoj estas Latvoj, 9 proc. Rusoj, 4 proc. Hebreoj, 3 proc. Germanoj kaj 2 proc. Poloj. La lingvo latva (kaj la litova) apartenas al lingvoj plej antikvaj en Eŭropo estante plej proksima al sanskrito. Oni trovas en ĝi multe da slavaj radikoj. Profesoro Meillet rekomendas studi ĝin al tiuj, kiuj dezirus aŭdi la ĉion de la lingvo parolata de la praloĝantoj eŭropaj.

Religio la Latvoj estas luteranoj (nur 18 procentoj da katolikoj).

La nivelo klerca estas tre alta, ĉar la analfabetuloj preskaŭ tute ne ekzistas. Ĝis la 16 jaro de aĝo daŭras la devo viziti

lernejon. Precipe bone prizorgita estas la duagrada lernejo. Unu meza lernejo (liceo) proporcias al 17 miloj da loĝantoj kaj havas meznombro 170 studentojn. La nove malfermita universitato en Riga havas 4500 studentojn. Latva specialeco estas abelista lernejo. La amon al klereco ĉe tiu ĉi juna regno montras ankaŭ la fakto, ke la registaro donacis al ĵurnalistoj kaj verkistoj belegan kastelon Segulda. Ĉiuj samideanoj legintaj la raporton el la Ligo de nacioj scias, kiel favoran kaj bone dokumentitan respondon koncerne esperanton sendis la latva registaro.

La kulturo de Latvoj konservis sian originalecon, kvankam ĉi tiu nacio ĉiam estis influata de Rusoj kaj Germanoj. Precipe fieraj estas Latvoj pri sia arta kulturo. La dramverkistoj Rainis kaj Blumau, la komponistoj Vitor, Darzin kaj Kalnin, la pentristoj Rosenthal, Purvits, Kazaks kaj Grosswalds meritas, ke la eŭropa kritiko ilin atentu. Tre grava por ĉiu etnografo kaj lingvisto estas kolekto „Latwiju dainas“, enhavanta 200.000 kantojn kolektitajn de Kr. Baron. Sciu, ke la latva nacio posedis antaŭ sia liberigo en la kantistaj societoj la ĉefajn batalantojn por sia kulturo. De tempo al tempo ili kunveturis (la unuan fojon en 1873) por organizi festivalon. En ĉi tiu jaro partoprenis en Riga 2500 kantistoj el diversaj regionoj en ĉi tiu grandioza festo.

La ĵurnalaro estas multenombra. En Riga mem eliras 13 ĉiutagaj latvaj ĵurnaloj, 2 rusaj kaj 2 germanaj. La ĉefaj estas „Jau-nakas Sinas“ (= Nova kono), „Latvias Sargs“ (= Latva gardejo) kaj „Latvijas Wéstnesis“ (Latva raportisto) kaj „Brihva seme“ (Libera tero).

Politike la registaro traktas tre libere la minoritojn, precipe la Germanojn. La strataj informtabuletoj en Riga estas plimulte latve-ruse-germanaj.

Latva parlamento havas 100 deputitojn. La plej forta partio estas la social-demokrata (37 anoj), poste centra bloko de novaj terkulturistoj (22 anoj), agrara asocio (17 anoj). Krom aliaj partioj ekzistas minorita bloko kun 17 deputitoj reprezentantaj Germanojn, Hebreojn, Rusojn kaj Polojn. Komunistoj tute ne havas reprezentanton.

La nacia konsilantaro latva kunsidis la unuan fojon la 17<sup>an</sup> de septembro 1917. Dum kvin jaroj de sia libereco la nacio atingis multon. La agrara reformo estas

preskaŭ finita, oni balotos ankoraŭ pri la kompensoj pagotaj al bienistoj. La mona unuo estas „lat“, kaj ĝia valoro estas fiksita firme.

Latvujo estas lando por transita komerco el Rusujo okcidenten. Antaŭ la milito nur la havenoj Riga kaj Liepaja prizorgis la kvaronon de la rusa komerco kun eksterlando. La haveno Riga kovriĝas per glacio nur dum 37 tagoj jare. Ventspils kaj Liepaja estas navigeblaj dum la tuta jaro. Oni eksportas precipe linon, bonegan buteron, lignon, paperon, papermaĉaĵon, celulozon, alkoholon, peltojn, ovojn, lardon, mielon, medicinajn kreskaĵojn kaj vitron. En Rusujon oni eksportas agrikulturajn maŝinojn, likvorojn kaj fiŝkonservaĵojn. Oni importas: karbon, feron, kotonon, ŝtofojn, ĥemiaĵojn, maŝinojn, rizon, spicojn, sukerojn kaj tanilon.

Ĉi tiu juna ŝtato ludos gravan rolon ekonomian. Prava estas la latva prezidanto, Ĉakste, amata reprezentanto de sia popolo, kiu analizante la karakteron de latva kamparano montras multajn ecojn similajn al karaktero slava. Tamen la latva karaktero ne estas tiom mola, ĝi estas pli persistema kaj entreprenema ol la karaktero de normala rusa muĵiko.

Ĉi tiu juna simpatia ŝtato kaj ĝia popolo travivinta spertojn tre maldolĉajn rajtas atendi plej esperplenan estontecon.

Rudolf Fridrich



## LA VIRINOJ EN LA ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO

Verkis Františka Plamínková. El la ĉeĥa manuskripto tradukis Marie Cimrová.

I.

KION ATINGIS LA VIRINOJ EN ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO.

Nacia kaj politika liberigo de la ĉeĥoslovaka nacio alportis al ĉeĥoslovakaj virinoj la politikan kaj civilan egalrajtecon — preparitan jam dum kelkaj jardekoj — kun jenaj praktikaj konsekvencoj: egalan rajton kun la viroj je klero, je laboro en ĉiuj fakoj kaj ĝian egalan ekonomian taksadon.

Tiu egalrajto montriĝis spontanee tuj post la revolucio per simpla allaso de virinoj en ĉiujn gravajn instituciojn (naciaj revoluciaj komitatoj, nacia revolucia parla-

mento, ekonomiaj konsilantaroj, komunumaj administraj komisionoj, ekzekutivaj komitatoj kaj prezidantaroj de unuopaj politikaj partioj ktp.).

Ĉiuj institutoj por edukado estis tuj malfermitaj ankaŭ al la virinoj. Same ankaŭ ĉiuj oficoj, en kiuj la virinoj estis kapablaj labori. La malpermeso de edziniĝo de oficistinoj en publikaj institutoj, de instruistinoj en ŝtataj lernejoj k. s. estis „via facti“ forigita, inter la salajroj de viroj kaj de virinoj ne estis farata plu diferenco. Tiel estis dum la revolucia tempo. Kaj per aperantaj leĝoj oni konfirmis tiun ĉi efektivan egalrajtecon. La konstitucio de la ĉeĥoslovaka respubliko (de 29. de februaro 1920) diras en § 106: la privilegioj de sekso, klaso kaj profesio ne estas rekonataj. La leĝo pri balotrajto speciale akcentas, ke tiun rajton havas ĉiuj civitanoj de la ĉeĥoslovaka respubliko „sen rigardo al sekso“. (Ni atentigas, ke aktiva kaj pasiva balotrajto por viroj kaj virinoj estas ĝenerala, egala, senpera kaj sekreta. La aktiva voĉdonrajto por komuna reprezentantaro kaj por parlamento komencas de 21. jaro de aĝo, por senato de 26. jaro; la pasiva por komunumaj reprezentantaroj de 26. jaro, por parlamento de 30. jaro, por senato de 45. jaro.)

La konsekvencoj (rezultato) de tiu ĉi leĝo estas ke en komunumaj balotadoj en jaro 1919 el ĉiuj elektitoj estis 12% de virinoj kiel komunumaj reprezentantinoj, ke multaj el ili estis urbaj konsilantinoj, vicurbestrinoj kaj tri estis urbestrinoj. Kaj samo estas en la nunjaraj 1923 balotadoj.

En jaro 1920 estis elektitaj en parlamenton 13 deputitinoj (hodiaŭ 14) el la suma nombro de 304 deputitoj; kaj 3 senataninoj el 150 membroj. (La balotado ne okazis en la tuta respubliko, ĉar kelkaj distriktoj ne havis ankoraŭ fikse destinitajn limojn, pri kiuj oni tiam traktis inter ŝtatoj devenintaj el la estinta monarkio aŭstria-hungaria, eventuale el Germanio.)  
(Daŭrigo).

---

UZU ESPERANTON PRAKTIKE  
KAJ POR TIU CELO ALIĜU AL  
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO  
[Informoj ĉe ni]

---

## MAX ŠVABINSKY

eminenta ĉeĥa pentristo, desegnisto kaj grafikisto (naskita en 1873 — antaŭ 50 jaroj — en Kroměříž-Moravio) estas aŭtoro de granda nombro de bonegaj portretoj, desegnaĵoj kaj pentraĵoj, kiuj faras fortan impreson pro siaj delikata desegno kaj harmonia koloreco. Speciale liaj koloritaj desegnaĵoj (desegnitaj per plumo kaj koloritaj per akvofarboj) estas majstraj verkoj de moderna kolorarto (du bildoj en Moderna ĉeĥa galerio „Kamelioj“ kaj „Paradizeoj“, vidaĵo de „Pulva turo“ en Praha kaj portretoj de kelkaj gravaj personoj). Liaj plej konataj verkoj estas du surmuraj alegoriaj pentraĵoj en Ĉeĥa landa banko „Sankta Venceslavo benanta ĉeĥan popolon“ kaj „Bonfarto kaj laboro“, granda rondoforma desegnaĵo per peniko „Apud teksmaŝino“, komponaĵo „En malriĉa regiono“, serioj „En praarbaro“, „Paradiza sonato“, „Bucolica“, bildoj de virinoj kaj precipe altvaloraj portretoj de multaj ĉeĥaj eminentuloj, ofte en naturaj dimensioj. La plej disvastigita estas lia bildo „Kuniĝo de animoj“, desegnaĵo de vivo kaj virino, kiu ĉirkaŭprenas la kapon de la viro kaj premas sian kapon al la lia. Švabinský desegnas per kraĵono, plumo, peniko, kretoj, karbo, hina inko, pentras per oleofarboj kaj akvofarboj personojn, pejzaĝojn, bestojn, kreskaĵojn egale majstre. Sendispute Švabinský estas ĉefa ĉeĥa reprezentanto de sia arto en la komenco de la dudeka jarcento.

— ou —



KELKAJ INTERESAJ CIFEROJ PRI ĈEĤOSLOVAKIO. La Ĉeĥoslovaka ŝtata instituto statistika konstatis laŭ la rezultoj de la lasta sumigo, ke ĉiu el la 13,595.816 loĝantoj de la Ĉeĥoslovaka respubliko povus ricevi el la riĉaĵoj de la lando post justa divido inter alie jenon: po 1 pom- aŭ pirarbo kaj por 1 prunarbo, du personoj 1 riban aŭ framban arbeton, tri personoj 1 ĉerizarbon, 14 personoj 1 nuksarbon. Plue, du personoj en Ĉeĥoslovaka respubliko havus proksimume 3 kortbirdojn, tri personoj po 1 bovo aŭ bovino, 5 personoj 1 porkon, 10 loĝantoj 1 ŝafon, 20 loĝantoj 1 ĉevalon kaj 30 loĝantoj 1 abelujon. En la teritorio de la Ĉeĥoslovaka respubliko estas jare produktataj po unu persono: 75 kilogramoj da tritiko, 120 kg da sekalo, 115 kg da hordeo, 100 kg da aveno, 490 kg da terpomoj, 90 kg da sukero, 120 litroj da lakto, 10 kg da butero aŭ fromaĝo, 60 ovoj, 2000 kg da karbo kaj 1500 kg da ferminaĵo.

Gz.





## ESPERANTISTA MOVADO



### LA PLEJ MULTENOMBRA KONGRESO

La XV. kongreso estis ĝis nun la plej granda koncerne nombron de la partoprenantoj. Aliĝis 4900 personoj el 35 ŝtatoj, efektive ĉeestis preskaŭ 3000. El la ekstereŭropaj landoj estis reprezentitaj Usono, Egiptio, Argentino, Aŭstralio, Ĥinio, Hindio, Japanio, Javao, Kanado, Meksikio. Kelkaj el la ekstereŭropanoj partoprenis vigle en la kongresa vivo. S-ro Wm Drummond en Melbourne ekz. faris eĉ interesan paroladon pri Aŭstralio. Bedaŭrinda afero estas, ke aliĝintoj francaj (29) kaj belgaj (11) ne povis veni nek sendi almenaŭ reprezentantojn. La loka komitato asertis, ke la publika opinio ne estus tion permesinta kaj analogion de la Internacia socialista konferenco en Hamburg ĝi ne trovis taŭga. Ĝenerale pripensante, oni devas kalkuli kun la neagrabla fakto kaj oni ne povas riproĉi malgrandan internaciecon al la Dekkvina. Foresto de Francoj kaj Belgioj estis kaŭzita nek de ili mem, nek de la KKK, sed de la „pli forta potenco“, ĝis nun ne influebla de la esperantistaro. Ankaŭ Rusoj ne povis praktike partopreni la kongresojn 12. kaj 13. kaj neniu dubas pri la internacieco de tiuj kongresoj.

La solena malferma kunveno okazis la 2an de aŭgusto je duono de la 12a, dum kutima jam entuziasmo. Certe eĉ skeptikula kroo ekstremitis pro ĝojo, kiam dum leviganta kurteno orgeno ekludis la himnon kaj la amaso pleniganta la halon kaj la estradon ekkantis. Kiu dubas, ke neprofitema idealismo movas la mondon, tiu venu kaj vidu tian kunvenon! La malferma programo estis kutima. Kiel prezidanto de la kongreso estis elektita Dro Dieterle, vicprezidanto Dro Ledermann, sekretarioj Jakob, Cseh, Petzold. Plej eminentaj reprezentantoj de publikaj aŭtoritatoj estis: ŝtatssekretario s-ro Schulz (reprezentanto de la respublika prezidanto) kaj la ĉefurbestro de Nürnberg s-ro dro Luppe. Tiu ĉi salutis la kongreson en trafaj esperantaj vortoj, la unua legis sufiĉe longan germanan paroladon pri graveco de nia movado kun pensoj al esperantistoj jam tro konataj. La sola rimarkinda parolado estis tiu de D-ro Privat, kiu sukcesis diri kelkajn novajn argumentojn por reala ekzisto de la interna ideo.

Reprezentantoj de la registaroj parolis sep (inter ili prof. St. Stejskal por la ĉeĥoslovaka). La kutimo, ke parolu delegito por ĉiu kongresa nacio estis forlasita; parolis sole 12 „naciaj vicprezidantoj“, el la plej multenombre ĉeestantaj nacioj. Mi bedaŭras tiun forlason, ĉar per tiaj salutoj estis, spite ilia tedeco, plej bone dokumentita la internacieco de niaj kongresoj.

La ĝenerala laboro de la kongreso okazis en tri laborkunsidoj (la 3an, 6an kaj 7an) kaj en la ferma kunveno (la 8an), kie oni aŭdis raportojn pri la fakkunsidoj kaj proponis la lokon de la venonta kongreso. La intereso pri la laboro estis ĝenerale negranda. Multaj kongresanoj neniel interesiĝas pri la movado, vizitante la kongresojn sole pro turista ĝuo. Tamen dum la kvar postmilitaj kongresoj pligrandiĝis la nombro de homoj serioze interesantaj pri la progreso de la movado, kapablaj sukcese en ĝi labori kaj pretaj subigi siajn personajn opiniojn kaj preferojn al la demo-

krate organizita komitato. Tiuj homoj garantias, ke nia movado progresos ankaŭ organize pli bone ol ĝis nun. Tial estas certe granda profito, ke la kongreso akceptis kun danko aplaŭdo la informon, ke la Centra Komitato konstituigis laŭ la deziro de la kongreso en Helsinko. De nun tiu ĉi komitato de 6 esperantistoj diversnaciaj estos ĝenerale respektata kiel la plej supera aŭtoritato en organizaj aferoj. Per tiu ĉi grava faro estis fine solvita la „organiza problem“, kiu estis temo de multaj niaj kongresoj. Sed simpla starigo de komitato neniel helpas se la esperantistoj efektive ne kunlaboros.

La raporto de la Lingva komitato, legita de s-ro Warden en la unua kunveno estis kompreneble unuanime akceptita, sed ĝi vekis preskaŭ nenian intereson; ĝi estas verkita tiel ke ĝi nepre mortigas ĉiun tian intereson. Oni ekscias sole, ke oni intencas ion fari, sed malmulton pri faktoj. Certe Lingva Komitato devas esti societo absolute aŭtonomia, sed ĝia konsisto devas esti tia, ke ĝi posedu aŭtoritaton nepre bezonan. Sed tio estas atingebla sole aŭ per teknikeco de la komitatoj, aŭ per konfido donita al ili de iuj gravaj korporacioj, ekz. naciaj societoj. La gvidantoj de la L. K. ne koleru por mia sincereco, sed atentu, ke pri la Tria aldono oni en esp. gazetaro preskaŭ eĉ ne raportis. Kaj tamen tia publikaĵo devus havi sensation aplombon.

La sola afero, pri kiu oni diskutis, estis diversaj aranĝoj de UEA (kiu laŭ nuna organizo ne plu havas apartan kongreson), precipe pri bezono de fidinda statistiko, organizo de praktika uzado de esperanto inter komercistoj, aranĝo de la Jarlibro. La kondukantoj de UEA pli bone komprenas la demokratajn principojn kaj agadmanierojn ol la kondukantoj de la centrala institucio lingvaj. Ili uzas la kongresajn kunvenojn por aŭdi la instigojn de la membraro, por agiti por efektivigotaj entreprenoj kaj admoni la membraron al daŭra kaj sistema laboro.

El klerigaj kaj amuzigaj aranĝoj kongresaj la plej bela estis vizito de Rothenburg, la plej grava estis prezentado de Natan la Saĝulo.

La aranĝo de la ekskurso estis tre bona, la programo bone dividita, efektive la tago de la ekskurso estis la plej agrable travivita el ĉiuj kongresaj tagoj.

La prezentado de Natan la Saĝulo, fama patosa kaj ideologia dramo de Lessing estis plej grava laŭ vidpunkto de la lingva kaj pronunca evoluoj. Profesiaj aktoroj germanaj ludis versan tradukon de ofte abstraktaj kaj artefaritaj frazoj. Ili ĝenerale bone ludis kaj klare pronuncis. Precipe la reprezentanto de Natan kaj de Monaĥejo montris talenton tre rimarkindan. La traduko de Karl Minor estas tre zorge farita, oni bone aŭskultas ĝin, tamen la prezentado montras mankon de la teorio de la tradukinto. Li klopodis traduki la liberan blankverson de Lessing per la sama nombro de versoj. Tio certe estis ĝuo por la tradukanto, sed ne por la aŭskultanto, ĉar el tiu tendenco rezultis multaj tro artefaritaj parolturnoj, kiuj postulis tro da atento de la aŭskultanto.

La popolo kongresa kondukis en la teatro maldece. Oni flustris, manĝis desertojn, ridis, kaj vekis ĝenerale la impreson, ke la plimulto de la ĉeestantoj ne komprenas tute aŭ parte la parolojn de la aktoroj. Estas bedaŭrinda fakto, ke inter tiuj malhelpantoj de la pura impresado kaj de la favora



juĝo de la neesperantista kritiko estis plejparte la plej bruaj „propagandantoj“.


Ankaŭ la muzikaj aranĝoj de la kongreso estis de tre alta nivelo. La prezentado de Meistersinger von Nürnberg, Madrigalkoncerto, Kantoj dum la protestanta diservo en la Sebalduŝ-preĝejo estis ĝuoj eĉ por tiu, kiu jam multon aŭdis.

Kabaredo en niaj kongresoj estas io nova. En Nürnberg ĝin aranĝis vigla rondo de la gvidantoj de la Literatura Mondo. Recitojn, kantojn, unuaktaĵojn, dialogon, parte kortuŝajn, parte gajajn eĉ ekscentrajn, sed nepre decajn prezentis grupo da

de ĝi monan rekompenson por sia malgajno. Mi nenion donis, ĉar mi pensas, ke la restoraciestro estus meritinta anstataŭ mono la punon, kiun la saĝaj Nürnberganoj aljuĝadis al la nehonestaj panbakistoj: trempon en la rivero!

Sed tamen, spite ĉiuj mankoj kaj malagrabloj, la kongresa semajno estis granda ĝuo por mi, kaj estis grava gajno por nia movado. Oni ne devas esti tro skeptika se oni volas plibonigi la staton de la mondo. La fakto, ke 3000 homoj el ĉiuj 5 partoj de mondo vivis dum sep tagoj kune, interparolante sole unu lingvon, estas tiom grava kaj

Max Ŝvabinský:



EL LIA VERKARO

gesamideanoj, lertaj sur la scenejo kaj spertaj en la lingvo. Estis ĝuo neordinara aŭdi nian lingvon tiel libere fluantan el la buŝo de dro Kálocsay, Baghy k. a.

La ĝenerala organizo de la kongreso ne fukiis ĉiam tro bone. Certe multo estas klarigebla pro la kriza stato de la kongresa lando kaj pro la alta nombro de la kongresanoj. Tamen kelkaj riproĉoj de la kongresanoj ŝajnis pravaj. Antaŭ ĉio la malgranda aŭ nula kono de esperanto ĉe funkciuloj en la akceptejo. Kelkaj el tieaj fraŭlinoj ne sciis diri esperante pli ol: „Ĉu vi parolas germane“. La divido de loĝejoj kaŭzis multajn ĉagrenojn. La palaco de kongresejo „Kulturverein“ ne estas konstruita tre praktike. La kongresanoj venintaj al la dua laborokunsido trovis la grandan halon nealirebla, ĉar oni preparadis tie tablojn por la festbankedo, kaj sur malgranda ĉifonita papereto sciigon, ke la kunveno okazas en la „babilejo“. La festbankedo poste sekviinta surprizis per multego de neokupitaj lokoj, kvankam oni vendadis biletojn pli frue kaj povis do konstati la nombron de la partoprenantoj. Sole 470 personoj bankedis anstataŭ atenditaj 1600. La kongresa komitato anoncis poste al la kongresanaro, ke la restoraciestro postulas

kuraĝiga, ke jam pro tio devas niaj kongresoj daŭri kaj disvolviĝi. Stan. Kamaryt.



### ESPERANTO INTER BLINDULARO

Oni ĝenerale tre malmulte konas la disvastigon de Esperanto inter la blindularo; kaj tamen ĝi estas proporcie multe pli forta ol tiu inter la vidantaj. Precipe profesoro Th. Cart, prezidanto de la „Akademio“ multe laboris por Esperanto inter la blindularo. Nun jam en dekkvin ŝtatoj troviĝas esp. blindaj konsuloj, kiuj komplezeme peras al blinduloj alilandaj informojn kaj servojn bezonatajn.

La unua intenacia kongreso de blindaj esperantistoj, aranĝita en la jaro 1921 en Praha, restigis belan sukceson; instruaj, zorge ellaboritaj referatoj de diversnaciaj raportantoj, pridiskutitaj tiam de la partopreninta blindularo, aperis antaŭ nelonge Braille presite. Ĉeĥoslovakujo estas en ĉi tiu multvalora publikaĵo reprezentita per detala, tre zorge kaj konsciencie kompilita raporto de sro. profesoro Stejskal „Pri la stato de blindulproblemo en Ĉeĥoslovaka respubliko“.

Poštovní úřad šekový v Praze.

## Stvrzenka

na vklad Kč ..... h....., t. j.


korun

pro šekový účet: **34.271**

u pošt. úřadu šekového v Praze.

Majitel účtu:

»Časopis »La Progreso«  
Praha.



T. č. 10. V. H.

Podpis pošt. úředníka.

Poštovní úřad šekový v Praze.

## Složenka


Vklad Kč ..... h.....

pro šekový účet číslo **34.271**

jež učinil

dne ..... 19.....

Poštovní razítko.



T. č. 10. V. H.

34

Poštovní úřad šekový v Praze.

## Súčtovanka

Vklad Kč ..... h.....

pro šekový účet číslo **34.271**

jež učinil

Vyplní strana.

Poštovní razítko



T. č. 10. V. H.

34

Vyplní strana.

Súčtovanka zůstane u poštovního úřadu šekového.  
Majitelé účtů nedovědí se tudíž o sděleních, která  
by na tomto místě byla napsána.

### Pro sdělení majitelů účtu.

(Dlužno však přilepiti výplatní známku stanovenou za dopisnice.)

---

Platenka musí býti ve všech třech částech podle předtisku přesně a zřetelně vyplněna a s penězi odevzdána poštovnímu úřadu. Lze ji vyplniti inkoustem, tiskem nebo psacím strojem. Jako den vkladu musí vkladatel napsati den, kterého se vklad skutečně děje.

Úředník poštovní opatří stvrzenku razítkem a podpisem, oddělí ji a vrátí podateli jako potvrzení, že peníze byly vloženy. Složenka a súčtovanka zašle se poštovnímu úřadu šekovému.

Platenky, na nichž jest něco vymazáno, přeškrtnáno nebo měněno, ať již ve vytisknutých slovech nebo ve vyznačení peněz, poštovní úřady odmítnou. Rovněž musí býti odmítány platenky nezřetelně vyplněné, příliš zašpiněné nebo roztrhané.

---

Dum la dua internacia kongreso de blindaj esperantistoj 1922 en Helsinki estis fondita la „Centra blindula statistikejo kaj informejo“. Praha estis elektita por ĝia sidloko kaj sub gvidado de la oferema samideano, profesoro St. Stejskal la nova institucio eklaboris. La laboro amasiĝas; kelkaj blindaj gesamideanoj fervore kaj ĝoje laboras por sia nova institucio, sed krom la labora helpo estos necese havigi ankaŭ firman financon bazon nepre necesan por simila internacia entrepreno. Komprenon por ĉi tiu bezono montris la „Societo de Ĉeĥoslovakaj nevidantaj esperantistoj“. kiu en sia lasta komitata kunveno la 14an de oktobro 1923, donacis al la citita institucio Kĉ 1000.— Imitinda ekzemplo!

Nunjare okazis en Nürnberg tria internacia kongreso de blindaj esp. El Ĉeĥoslovaka respubliko partoprenis ĝin karavano de 17 personoj gvidita de prof. Stejskal. La vizitintojn speciale impresis la vizito de fabrikaj laborejoj de blindaj laboristo ĉe la firmao Siemens & Comp., kie oni trovis pruvon, ke la blindulo povas esti same lerta laboristo, kiel la vidulo kaj perlabori sian sufiĉan porvivon sendepende de publika humaneco, se la fabrikestroj dungas ilin por laboroj, kiujn ili tute bone povas prizorgi. En Germanujo devigas la leĝo ĉiun fabrikestron, havi inter sia laboristaro certan procenton (2) da blinduloj. La leĝo montriĝis efektive bona; ĝi neniel malgajnis la dunganton ĉar la blinduloj atingas la saman lertecon, kiel la viduloj.

Per esperanto la blinduloj informiĝas pri la progresoj atingataj de iliaj samsortanoj en aliaj landoj kaj la spertojn akiritajn ili utiligas hejme. Koscianta neceso de komuna laboro ili grupiĝas. Tiel starigis nunjare en nia respubliko „Societo de Ĉeĥoslovakaj nevidantaj esperantistoj“ (mallonge SOĈNE). Ĝi havas jam 82 membrojn en diversaj lokoj de nia ŝtato kaj interrilatas kun siaj lokaj aŭ regionaj konfidatoj. La societo celas disvastigi esp. inter la samsortanoj kaj per esperanto, laŭ la cirkonstancoj alilandaj, plibonigi la situacion de nia blindularo. Ĝi havas ankaŭ sian presorganon, „Aurora“ kiun la membroj ricevas senpage. Ĝi grupigas ne nur blindulojn, sed ankaŭ iliajn amikojn kaj liveras tiel al ĉiu vera kaj sincera esperantisto la okazon, por helpi al disvastigo de Esp. inter la blindularo. La kotizaĵo estas por membro-fondanto Kĉ 100.— por unufojo kaj por membroj subtenantoj Kĉ 4.— jare. Kasisto estas sro. Otto Schlem, Praha II., Vodičkova ul. 48., al kiu oni povas sendi la kotizaĵon. Precipe la grupoj kaj societoj esperantistaj devus subteni la fratan, memstaran organizaĵon de niaj blindaj samideanoj.

Estos necese eldoni per Braillo preso vortarojn kaj lernolibrojn esperantajn, kiuj estas jam tre urĝe bezonataj, ĉar nur en Praha estas 5 kursoj esp. por blinduloj, kiujn partoprenas ĉirkaŭ 120 personoj. En Blindulejo Klár mem estas tri kursoj. Du por Ĉeĥoj kaj unu por Germanoj. La ĉeĥaj kursoj estas envicigitaj kiel deviga temo de la ŝtata metiista lernejo por la blinduloj.

B. Vlčková.



Ĉu vi estas jam membro de Ĉsl. Asocio Esp.?

Se ne, vidu Oficialan Informilon p. 14.

## ĈEĤOSLOVAKA MINISTERIO DE INSTRUADO KAJ ESPERANTO.

Ni prezentas al niaj legantoj kolekton de la dekreto de ĉsl. ministerio de instruado, pri esperanto: La kolekto estas farita de S-ro A. Pitlík, direktoro de Ĉ. E. I.

I. Lektorato de esperanto en la alta lernejo por specialaj sciencoj ĉe la teknika lernejo en Praha estis fondita la 13./XI. 1922 no 115.445 instr. min. (L. A. Pitlík).

II. Enkondukon de esperanto en duagradajn lernejojn rilatas dekreto de la 27./III. 1921 no 5545/21 i. m. publikigita sub no I. B. 718-31171 de la 14./IV. 1921 (Landa lerneja konsilantaro) sur. p. 185 en no 20a de la jarkolekto 1920-21 de la oficiala bulteno „Věstník“:

„La ministerio estas preta en lernoĵaro 1921-22 ĉie, kie por instruado de esperanto estos favoraj kondiĉoj personaj kaj aferorilataj, permesi nedevigan instruadon de ĉi tiu lernobjekto en ŝtataj duagradaj lernejoj. Oni ordonas al la direktoro, ĝis fino de la lernoĵaro 1929-21, kondiĉe, ke anoncos sin sufiĉa nombro da partoprenantoj por la venonta lerneĵaro, proponi la enkondukon de ĉi tiu lernobjekto kaj instruplanon kaj sciigi, kiamaniere la proponita instruisto akiris rilatan kapablecon.“

III. „Věstník“ jarkol. III. no 74, la 15./V. 1921 konatigis provizoran normalan instruplanon por komercaj akademioj, kie esperanto estas menciita inter la nedevigaj lernobjektoj. La rilata punkto (23) estas jena:

„2 lecionoj semajne en komuna kurso. Esperanton oni instruas en kurso, en kiu estas akceptataj sole lernantoj, kiuj almenaŭ 3 jarojn lernis iun roman lingvon.“

IV. La esperanta instruado ĉe Ŝtata industria lernejo en Liberec (Reichenberg) estas permesita per dekreto no 76448-III. de la 21./VIII. 1923 min. instr. kiel libervola fako sub la kondiĉo, ke la ŝtata kaso per tio ne estos ŝarĝata.

(Daŭrigo.)

## LINGVA FAKO

### NEKSTA.

En iu gazeto aperis tiu ĉi nova vorto (nekstan matenon, priŝtiho jitra). Samideano nekompreninta ĝin demandis pri ĝia signifo en E. T. Sekvis klarigo kaj diskuto por kaj kontraŭ. Por ni tiu ĉi vorto estas ekzemplo de facilanimeco, senbezona enkonduko de novaj vortoj. Oni estas same klare komprenata, se oni diras, kiel oni pli ol 30 jarojn diradis: la sekvintan matenon, en la venonta numero, ĉar ĉiam ni komprenas: la tuj sekvinta, la unua el la sekvintaj, la unua el la venontaj n-roj. Nenia konfuzo iam naskiĝis, ĉar se oni ne volas diri: en la unua el... oni diras: en unu el la sekvintaj tagoj, en unu el la venontaj n-roj. Al serĉemuloj de novaj vortoj ni konsilus direkti ilian energion al la kampo de teknikaj esprimoj, kie ilia laboro povus esti efektive utila.

R. H.

## I. TEXT K PŘEKladU.

Zahajujeme v tomto čísle uveřejňování textů k překladu do esperanta. Súčastníci se mohou všichni odběratelé „Progressa“. Překlady pište po jedné straně čtvrtarchu, čitelně, inkoustem a zašlete do 15. prosince na adresu redakce. Třem nejlepším překladům bude odměnou zasláno po jedné knize Zamenhofově. Správný překlad s poznámkami a opravami bude uveřejněn ve 3. čísle.

**Papírový věk.** Nejprve byl věk zlatý, jak ví každý čtenář Ovida. Potom kamený, bronzový, železný atd. Jak bychom nazvali věk, který právě prožíváme? Myslím, že bude nazván věkem papírovým. Neboť ničím nevyznačuje se náš věk tak, jako spotřebou papíru. Není tomu dávno a papír byl jenom ku psaní a balení. Dnes nenajdete oboru výrobního, který by neupotřeboval papíru. Z papíru vyrábí se šaty, prádlo, nábytek, nádobí, staví se z něho. Nahraňuje kov i kámen, vlnu, bavlnu i sklo. To je první důvod, proč bude náš věk nazván papírovým. Jsou však ještě jiné. Není celý náš život z velké části papírový? Uvažte jen, kolik ze svých vědomostí, poznatků i citů a dojmů jsme načerpali prostřednictvím papíru? Odmyslete si z moderního života papír, knihu, noviny — co vám zůstane? Ale papír, který nám tolik dává, také nám mnoho bere. Postavil se mezi nás a život jako nepostradatelný prostředník, bere nám bezprostřední styk se skutečností, podáváje nám ji často přecezenou, ochuzenou a vyčichlou. Oč opravdověji, skutečněji žili naši předkové, kteří neměli papírových dojmů, čerpající vše z pramene života. Novověký člověk stvořil si nový svět z papíru. Má ovšem také své krásy, ale je přece jen papírový. Papírový je náš věk také proto, že nejkrásnější jeho vymoženosti máme na papíře. Tak na př. odzbrojení, světový mír, společenskou rovnost. Papírový věk je nádherný — na papíře. Skeptikům, kteří v něj nevěří a chtějí se přit, že papírový není, podám ihned nezvratný důkaz! Mohou si proň ostatně sami sáhnouti do peněženky!



## REVISE NAŠICH SLOVNÍKŮ.

Základní slovníky pro československé esperantisty jsou: Čejkův úplný „Slovník esp.-český“ (1908) a Kühnlův-Procházkův „Slovník česko-esp.“ (1914). Oba tyto slovníky jsou a budou ještě dlouho pro esperantisty čsl. jediným obšírným souborem slovní zásoby esperanta a jediným rádcem při překládání. Oba — ač různé kvalitou — jsou plodem namáhavé a pečlivé práce, která zasluhuje uznání a ocenění. Oba však jsou dílo lidské, které nemůže býti prosto neúplnosti a i chyb. Kromě toho dnes, po mnoha létech skvělého rozkvětu esperanta

po stránce jazykové, jsou do jisté míry zastaralé; nutně v nich schází, co vzniklo po jejich vydání — a je toho hodně — a je v nich leccos nepřesného, co teprve později nabylo jasnosti a přesnosti — i toho není málo.

Jejich revise měli by se súčastníci všichni, kdo těchto slovníků používají kriticky. Mnohý z nás má o nich záznamy, jež tvoří vzácný material, který však je rozptýlený a nepřístupný. Spojiti tento material a učiniti jej přístupným všem čl. esperantistům je úkolem této rubriky.

*Každý, kdo našel nějaké 1. zlepšení, 2. opravu, 3. doplněk těchto slovníků, zašli nám své návrhy a my postupně je ochotně uveřejníme, přirozeně se jmény zasílatelů. Uveřejněné návrhy mohou se státi předmětem kritické diskuse schopných odborníků a základem pro vypracování nových slovníků kolektivní práci všech čl. esperantistů. Zasílatelé ovšem musí dbáti, aby se nepakovali. Naproti tomu i k uveřejněným návrhům jiných každý může zaslati své návrhy odchylné. Příspěvky řadte abecedně a ve stejné úpravě, jaké se užívá ve slovnících. Za navrhovaný tvar napište do závorek tvar zlepšovaný, v případě, že některý tvar zavrhuje, napište před zavrhané slovo v závorce slůvko *ne*, na př. s hořeti tutbruli (*ne* forbruli).* Bh.

## I.

## NÁVRHY PROF. RUD. FRIDRICHÁ:

antikvář antikvaĵisto  
antiseptický antisepta  
aviatik aviadisto  
bezzvládný sen movoforto  
bác! pum!  
běžío něco (v řeči) temas pri io, estas afero pri io  
brusliti glitilkuri (glitkuri)  
cukrovka sukerbeto  
červotočivý vermoborita  
jak daleko je z-do-kiom distance estas de al (malproksime)  
hledišťe (divad.) rigardantejo (rigardejo)  
hrátisina pána ŝajnigi mastron (ludi sinjoron)  
hřbitov tombaro (tombejo)  
husíkůži dostávám mi ekhavas frosthaŭton  
chuť mám mi apertitas, emas  
chůva infanistino  
idealista idealulo  
ježíse vlasy disstariĝas  
kapela muzikistaro (kapelo)  
kavalerista kavaleriano  
kostka (hrací) jetkubo, ludokubo  
kynouti (těsto) fermentiĝi (ŝveli)  
manšeta (na kytici) bukedingo  
mateřské známénko denaska makulo  
měsíčná noc lunluma nokto (Pokrač.)

## BIBLIOGRAFIO

### Libroj.

**LITOVA ALMANAKO.** El litova literaturo, penso kaj vivo. Eldonis Litova Esperanto Asocio, Kaŭnas 1923. — 284 paĝa bele presita libro eldonita kun helpo de litovaj bankoj kaj firmoj. Prezo 20 Kĉ. Ĝi enhavas ĉiujn utilajn informojn pri juna litova republika, ĝia nacio, historio, arto kaj ekonomio. Poemoj kaj prozaĵoj de Maironis Kreve, Vajžgantas, Peleda, Peĉkauskaitė kaj Biliunas, trafe elektitaj kaj zorge tradukitaj, karakterizas la animon de la simpata nacio, kiun vi komprenos leginte la tradukojn de dajnoj (naciaj kantoj). Tre detala recenzo pri la romano „Fürsten ohne Krone“ de Nienkamp interesos ĉiujn esperantistojn. Oni povas sincere gratuli profesoron prelaton Dombrovski, samideanon jam el jaro 1887, kiu grupigis ĉirkaŭ si tiom ferverajn batalantojn. Pri la eldono meritis precipe gesinjoroj Maĉernis, kiujn helpis Saulys, Blažys, Koch, Bartoševičius, Alseika, Tjunaitis kaj Klimas. Ke ili ne multe atentis la malfavoran kritikiston, kiu pruvis, ke eĉ sub la haŭto de sennacieca homo povas kaŝi sin koro sensenta por sufero. Ne por tio kreis Zamenhof esperanton, ke ni silentu pri imperialismo. Kun sinjoro Dombrovski mi malaprobas la nacian kanibalism. Rud. Fridrich.

Riedl L.: **DUM TAGOJ KAJ DUM NOKTOJ.** (Poemoj). Praha 1922. Paĝoj 22. Eldono de la aŭtoro. Dekdu poemoj de formo montranta lertan uzadon de la lingvo; la inspiro de la juna versfaranto estas ankoraŭ tro naŭva, la optimismaj humoroj estas egale nedokumentitaj kiel la pesimismaj. Sed la priskribo de la percepto de la naturo estas kelkfoje tiel ĉarmaj, ke oni povas esperi sukcesan evoluon. S. K.

**BES-A ADRESARO** de esperantistoj el ĉiuj landoj 5-a eldono. 28 p. 11×14 cm. Prezo 1 ŝv. fr. (Kĉ 6.—). Enhavas 342 adresojn de esp-istoj kaj esp. entreprenoj. Specialaĵo de tiu ĉi ŝatata adresaro estaj indikoj pri la personeco, grado de scio de esp., liberhora okupo ktp. plue Registro laŭ profesioj, inklinoj, firmoj laŭ fako k. s., sekve de kio ĉiu povas elekti por si la plej konvenan respondanton. (Vidu anoncon.)

**GVIDFOLIO TRA LA URBO BRATISLAVA** (Pressburg, Pozsony). Eldonis Porfremdula asocio en Bratislava, Župné nám., sub aŭspicioj de UEA. Verkis Dro St. Kamaryt, del. de UEA. 4 p. unu ilustraĵo. — Bele aspektanta, lerte verkita informilo pri „urbo, kiu plej multe gajnis per la nova politika organizo de centra Eŭropo“. La laboro povas servi kiel modelo al samideanoj intencantaj eldoni gvidfolion pri sia urbo. La vorton „keo“ en la dua alineo de la dua paĝo ni ne komprenas (eble kajo?). Hmd.

### El la gazetaro.

**SENNACIECA REVUO N-RO 43** (novembro), organo de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) skribas: **Komparo:** Oni ekkonas gravecon de movado per konsidero de ĝiaj gazetoj kaj kongresoj. Malgranda kalkulo statistikos pri komparitaj esperanto-kaj ido-movadoj. — Esperanto-kaj ido-kongresoj okazis en sama lando laŭ samaj cirkonstancoj. En Nürnberg sin anoncis 5000 esperantistoj kaj en Kassel 418 SAT-anoj. Por ĈIUJ ido-kongresoj en

Kassel sin anoncis 240 personoj. En Nürnberg partoprenis 3250 esperantistoj kaj en Kassel 252 SAT-anoj. En Kassel kongresis 160 idistoj. El tio oni povas konkludi, ke pli ol 20 esperantistoj respondas al nur 1 idisto. El 100 mondlingvanoj estas: 95 esperantistoj, 4½ idistoj kaj ½ alilingvanoj.

**GERMANA ESPERANTISTO N-RO 332** (oktobro) anoncas novan aranĝon. Ĝi aperos en duobla amplekso fandiĝinte kun Esperanto-Praktiko, kiu ĉesas aperi pro la malfacila ekonomia situacio en Germanio. La raportanto pri la XIV. kongreso dubas pri vereco de la vortoj diritaj en la malferma kunveno de profesoro Stejskal, oficiala delegito de ĉs. registaro, kiuj certigas, ke la simpatio por nia movado ĉe la ĉs. registaro estas daŭre vigla. Ni rekomendas al la atento de la raportanto la artikolon Dekretoj de ĉs. ministerio de instruado pri esp-o, precipe la alineon pri nova sukceso en la germana industria lernejo en Reichenberg. (v. p. 10)



### AL LA LEGANTOJ!

Ni prezentas al vi la unuan numeron de La Progreso de la nova redakcio kaj administracio. Spite la pligrandigita amplekso ni ne povis jam en tiu ĉi numero realigi ĉiujn niajn planojn. Ni esperas, ke trovos vian kontenton kelkaj novaj rubrikoj kiel Lingvaj konsiloj, El la gazetaro, Oficiala informilo de CAE k. a. la ceterajn ni devis prokrasti por la venonta n-ro, kiu aperos la 20 Decembro.

Per tiu ĉi n-ro komencas nova jarkolekto, la sepa. La abonintoj de la sesa en Plzeň ricevos senpage la 4 numerojn al ili apartenantajn. Se la gazeto plaĉas al vi, ne hezitu sendi la abonon. Kiu sendos ĝin antaŭ la 15. Decembro rajtas elekti unu el la jenaj libroj, senpage sendotan al li:

Zamenhof: Fundamento de esperanto.

Zamenhof: Esenco kaj estonteco de L. I. franca kaj esp. aŭ la samon en ĉeĥa traduko.

La gazeton gvidas Redakcia rondo kaj ĝian ekziston ebligis grupo da bonvolaj samideanoj. Mi estis komisiita de ili reprezenti la gazeton antaŭ la publiko. Dankante kore al ĉiuj, kiuj subskribis la alvokon sur la unua paĝo, mi esprimas la esperon, ke ni ĉiuj sukcesos krei el La Progreso gazeton plene respondantan al la deziroj de ni ĉiuj.

Hromada Rud.



**BAUDOIN DE COURTENAY**, profesor srovnavaciho jazykozpytu na universitě ve Varšavě:

Esperanto jest skutečná řeč, má veškeré znaky pravé „přirozené“ řeči. Není příliš jednostranně románské, ani není příliš umělé, má tedy praktické výhody přede všemi ostatními systémy světového jazyka. Jeho slovník je utvořen velkolepě. Na všechny opravdu životné jazykové složky je brán zřetel. Esperantský slovník měl by být vzorem všem ostatním slovníkům. Dr. Zamenhof došel pouhou intuicí téměř téhož slovníkového systému, jenž se považuje za ideál námi nedostižný, jehož však dosáhli sanskritští gramatikové a lexikografové. (—ch.)

## KRONIKO EL ĈEĤOSLOVAKIO

### Oficiala raporto de Ĉsl. Asocio Esp.

**Oficiala instruado de E-o.** Ĉar la nedeviga instruado de E. troviĝas en la oficiala instruplano de komercaj akademioj, tiu ĉi instruado okazas en Komerca Akademio de Hradec Králové (instruas prof. Smeták), en Bratislava (instr. prof. Jukl, por 14 lernantoj de la 3. kaj 4. klasoj). Ministerio de instruado enkondukis devigan instruadon de E. en la nove fondita metia lernejo por blinduloj en Instituto Klár en Praha. F-ino Vičková instruas 32 komencantojn kaj 24 progresintojn. Uzata estas la konata lernolibro de F-ino Šupichová transskribita per braja skribo. Kun permeso de la ministerio de instruado, S-ro Loveček instruas en burĝaj lernejoj de Třebíč (Moravio) 40 knabojn kaj 50 knabinojn (11-14 jarajn).

**Novaj grupoj** fondiĝis en Domažlice (sekr. J. Drvota, komercisto) 16 m., en Opava (prez. poŝta direktoro Horák, sekr. Otava) 30 m., precipe poŝtistoj kaj fervojistoj, kaj en Nové Zámky (prez. Dr. K. Körper, teologia profesoro, sekr. J. Schmiedt, elektristo, del. de UEA) 34 m.

**Novaj kursoj:** En Praha instruas dir. Eiselt (17 p.), S-ro Pitlík (31 p.) F-ino Hlaváčová 30 p. kaj F-ino Dandová 20 progresintojn. F-ino Plzeňská gvidas kurson por 16 p. en Katolika Sekcio. Domažlice: Staciestro Köhler gvidas kurson por 30 p. Opava: Nova kurso por 36 p. (inter ili 20 soldatoj). Instruas poŝta direktoro Horák. Olomouc: Du kursojn por 60 policianoj gvidas S-ro Kudela, del. de UEA. En klerigaj kursoj popolaj instruas S. Neuzil, lernejestro. Ústí nad Orlicí: Kurson por 23 komencantoj gvidas instruisto Barkman, por 15 progresintoj S-ro Vašíček. Třebíč: 60 gestudentoj de la ŝtata gimnazio lernas esp. Nové Zámky: Kurson por 53 p. (8 laboristoj) gvidas S-ro Geider.

**Publikaj paroladoj** okazis: En Praha la 1./X. F-ino Šupichová parolis antaŭ 100 p. La 29./IX. F-ino Dandová, S-ro rev. Zelenka kaj Buhr parolis en Esp. Sekcio Katolika por 20 p. Ústí nad Orlicí: La 4./X. S-ro Barkman parolis antaŭ 50 p. Prof. Fridrich el Brno parolis la 9./IX. en Třebíč (120 p.), la 21./X. en Přerov (600 p.) kaj la 23./X. en Brno (Societo Libera Penso, 30 p.)

**Ekspozicioj.** Praha: Ekspozicio de esp. gvidlibroj kaj aliaj reklamiloj turismaj estis parto de la ekspozicio de Centro de Turistaj Asocioj ĉeĥoslovakaj en Art-industria Muzeo (3-20. Okt.) Přerov: Ekspozicio de la loka Klubo de 14-21, finita per akademio ĉeĥo-esp.

**Regionaj konferencoj.** Orientbohemia la 8-9. Sept. en Malé Svatoňovice, partoprenantoj el 22 lokoj. - Raportoj de O. Ginz, sekr. de ĈAE, de O. Skleněčka, ĉefdel. de UEA kaj delegitoj de diversaj lokoj. II. Konferenco de Silezio kaj Norda Moravio la 7. Oktobro en Opava. Partoprenis 35 personoj el 15 lokoj. Raportis R. Hromada, ĝen. sekr. de ĈAE kaj reprez. de regionaj urboj.

**Gazeta servo.** En ilustrita revuo Český Svět aperis foto de konataj samideaninoj F-inoj Drezen el Tallin, en naciaj kostumoj estonaj. — En familia

revuo Šťastný Domov informa artikolo pri E. kiel respondo al antaŭa nefavora artikolo en la redakcia korespondejo. Krom tio ĉiusemajne en ĵurnaloj de Praha kaj multaj provincaj gazetoj estas notizoj pri progresoj de E. Hmd.

### Amika kunveno

de ĉeĥaj kaj germanaj samideanoj, aranĝita de la distrikto „Böhm. Leipa“ de Germana Esperanto-Ligo kaj vizitata de ĉirkaŭ 100 p. (20 ĉeĥoj) okazis la 10. kaj 11. Novembro 1923 en Česká Lípa (B. Leipa).

Sabate la 10an vespere okazis en la bele ornamita salonego de „Schützenhaus“ interkonatiĝa kaj amuza vespero kun parolado de S-ro Ulrich, muzikantoj, teatra prezentado kaj dancado.

Dimanĉe la 11an antaŭtagmeze okazis labor-kunsido, prezidita de S-ro Taubmann. En la nomo de Ĉsl. Asocio Esp. salutis la kunvenon S-ino Keyzlarová. Referatojn prezentis: 1. O. Skleněčka: „U. E. A. teritorio ĉeĥoslovaka“, 2. A. Pitlík kaj Inĝ. G. Scholze: „Komunaj laboroj de Ĉ. A. E. kaj G. E. L.: a) manifestacioj, b) interrilatoj kun centraj ŝtataj oficoj (precipe kun la ministerio de instruado) kaj c) regula interŝanĝado de oficialaj protokoloj inter ĈAE kaj GEL.

Akceptitaj deziresprimoj, transdonitaj al ambaŭ centroj:

1. Ĉiu esperantisto aliĝu al UEA, en ĉiu loko funkciu delegito de UEA

2. La naciaj asocioj starigu statistikon pri esperanto, bazitan sur la demando de UEA

3. La II. ŝtata esperanto-kongreso okazu pentekoste 1924 en Reichenberg (Invitis Inĝ. Scholze)

4. ĈAE kaj GEL preparu regularon de Internacia Delegitaro Respublika (IDR), kiu konsistos el 3 paroloj, delegotaj de ambaŭ centroj por prizorgi a) interrilatojn kun centraj ŝtataj oficoj b) tutŝtatan statistikon pri esperanto kaj c) komunan propagandon.

Post komuna tagmanĝo Schützenhaus kaj fotografado oni vizitis la klubejon de E.-Grupo ĉe „Kaiser“, kie oni babilis kaj dancis ĝis la forveturo de la vagonaroj.

La bone aranĝita kunveno estis tre sukcesinta. Oni esperu, ke ĝi ne estos la lasta. La komuna intereso postulas daŭrigon. Vivu sekvantoj.

A. Pitlík.

**Ĉeĥoslovaka Esperanta Instituto.** Fondo: 1923. — Celo: Sistema propagando de esperanto kaj peresperanta propagando de Ĉeĥoslovaka respubliko. — Servoj: Informoj, paroladoj (kun lumbildoj), fakaj kursoj, tradukoj, propagando, eksterlandaj interrilatoj, publika esperanta biblioteko kaj legejo. Esperantista hejmo. Privata esperanta lernejo (6 monata por komencantoj kaj progresintoj), malfermata ĉiujare la 2./I. kaj 1./X., estas sub kontrolo de la instrua ministerio. — Membroj: ordinara, subtenanta, dumvivaj kaj korespondantaj. — Estraro: Prez. A. Pitlík, ĝen. sekr. V. Čánský, komitatanoj: J. Eiselt, J. Šupichová, S. Dlouhá, Frant. Hájek, K. Hlaváčová. Revizoj: F. Novák, B. Weiner. Anstataŭantoj: F. J. Havelka, Dr. M. Laurinová, A. Paukert, B. Molnár. — Adreso: Praha, II, Krementová 17.



	<b>OFICIALA INFORMILO</b>	
--	---------------------------	--

De Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista Praha VII.  
Sochařská 333.

Fondo: 1920. Celo: Propagando, statistiko, servoj. Organizo: konsistas el membroj de grupoj, kiuj pagas jare po 2 Kč po membro kaj el izoluloj pagantaj 10 Kč jare.

Petu aliĝilon kaj pagilon laŭ la supra adreso.

\* \* \*

#### ANKETA O ĈS, ESPERANTSKÉM HNUTÍ.

**M**ohutný rozmach esperantského hnutí v našem národě nutí k soustředění sil a k cílevědomé dělbě práce. Svaz československých esperantistů dává podnět k anketě, která má sebrati cenné pokyny pro organizaci práce v nejbližší době, jakož i přání všech československých esperantistů, kteří si upřímně přejí nejen rychlého, ale i pokud možno dokonalého rozvoje esperantského hnutí v našem národě. Anketa má též připravití půdu pro konferenci esperantských pracovníků, která prodebatovala by česko-esperantským institucím pevné linie pro další práce. Dopisy buďtež řízeny Svazu československých esperantistů v Praze VII., Sochařská 333 anebo panu O. Skleněkoví, hlavnímu delegátu UEA v Hradci Králové.

**Kluby** svazové žádáme o vyplnění dotazníku s daty za měsíc listopad a zaslání nejdéle do 5. prosince. Proč některé kluby nezaslaly dotazník za říjen? Nepřejí si, aby o jejich činnosti bylo referováno, či snad . . . ?

**Propagační daň** 1 Kč měsíčně. Na různé dotazy sdělujeme, že daň tato je samozřejmě dobrovolná a svaz ku placení nikoho nemůže nutiti. Doufá se pouze, že členové pochopí, že obnos 1 Kč měsíčně může si odeprít pro naši věc snad každý, tím spíše, že na druhé straně několik jednotlivců věnuje čas, energii i sumy peněz daleko větší. A z malé této částky může vzejít obnos velký, jenž věnován k účelům propagačním by prospěl myšlence naší způsobem nad očekávání skvělým.

**Literární odbor.** Vedení jeho vzal na se pan prof. Rud. Fridrich (v Králově Poli, Purkyňova 79), člen výboru Svazu. Přijímáme další přihlášky členů, kteří mají čas i chuť překládati z češtiny do esp.-a. Upozorňujeme na soutěž o knižní premie za nejlepší překlad daného textu (v. str. 11).

Jos. Eiselt, předseda, Rud. Hromada, gen. sekr.

\* \* \*

#### IV. KOMITATA KUNVENO DE ĈAE

okazis sabate la 3. novembro 1923 en Praha, kafejo Edison inter la 20.15 kaj 0.35 horo. Partoprenis: Barviř Brno, Eiselt, Ginz, Hromada, Janoušek, Novák, Pitlik Praha, Skleněčka Hradec Králové. Foreston klarigis Šupichová kaj Ing. Berger (Moravany).

**Honora komitato.** Al ĉiu el ĝiaj 60 membroj oni sendos francligvan protokolon pri la Venezia konferenco.

**Enketo pri la ĉsl. movado.** La teksto de Skleněčka estis jam publikigita en ĵurnaloj de Praha. Membroj de Prop. Sekcio kopiu ĝin el tiu ĉi numero (v. supre) kaj publikigu en la gazetoj komisiitaj al ilia laborkampo.

**Rabatoj en hoteloj** por membroj de ĈAE. Laŭ alvoko publikigita de S-ro Pitlik en Hotelier, du hoteloj estas pretaj doni tian rabaton. La afero estos daŭrigata. S-ro Skleněčka atentigas pri Esp-istaj renkontejoj, kies adresoj troviĝos en Jarlibro de UEA 1924.

**Klubo en Domažlice** aligis 16 membrojn, kiuj estis akceptitaj. Sukceson al la nova klubo!

**Al la kluboj** estis dissendita Demandaro, por resendi ĝis la 5a de ĉiu monato. La kluboj lasintaj tiun ĉi gravan Demandaron sen atento, estas petataj senprokraste ĝin resendi, zorge plenigitan.

**Progreso.** Ĉar la lasta kunveno de la 29. septembro 1923 akceptis Progreson kiel oficialan organon de ĈAE, la komitato unuanime konsentas, ke la adresaro de ĈAE estu donita al dispono de la administracio.

**Vojaĝo de la ĝen. sekr.** al Silezio kaj Moravio. S-ro Hromada raportas pri regiona kunveno en Opava, pri traktadoj kun diversaj esp-istoj, pri vizito al kluboj Olomouc kaj Brno. Ĉar li alportis el sia vojaĝo 186 Kč (58 el kunveno Opava, cetero por venditaj presaĵoj), oni decidas pagi almenaŭ liajn elspezojn fervojajn.

**Partoprenon de Praha'a komitatano** en la regionaj kunvenoj, ofte petatan, oni trovas necesa. Multaj lokoj krom tio postulas delegon de esp. paroladisto ktp. Ĝenerala sekretario deklaras, ke ne ĉiam estas eble, ke la delegita membro de komitato pagu la elspezojn el la propra poŝo. Ĝis nun la Asocio parte pagis sole 2 resp. nun tri tiajn vojaĝojn, kvankam ĈAE estis reprezentita ĉe multaj reg. kunvenoj. La komitato unuanime dankas al S-ro Hromada por lia ĝisnuna agado en tiu ĉi direkto. En urĝaj okazoj tri membroj de la komitato estis komisiitaj decidi pri delego.

**Komuna kunveno en Ĉeská Lipa.** Oni komisiis gen sekr. paroli tie pri komunaj laboroj. (Estis poste malhelpita veturi tien). Oni konsentas, ke okazu II. respublika kongreso en 1924 en Reichenberg.

**Financoj.** Stato la 31. Oktobro, laŭ raporto de S-ro Janoušek, nuna kasisto (pro trookupo de S-ro Novák). Enspezoj: kotizoj Kč 1137.—, venditaj presaĵoj Kč 336.10, propaganda imposto Kč 1372.—. Elspezoj: administraj Kč 874.06, por propagando Kč 7362.86. Havaĵo Kč 1282.55. Fine S-ro Skleněčka invitas al la regiona kunveno de Dvůr Králové la 2 februaro 1924 kaj informas pri la granda entrepreno de UEA por gajni anoncojn por la Jarlibro 1924.

Jos. Eiselt, prez.

Protokolis Otto Ginz.



## PROPAGAČNÍ ODBOR

### PROTI ESPERANTU A PRO NĚ

#### 1.

Neorganickou směsí a hatlaninou nazývají někteří poloučenci esperanto. Zdá se, že spokojili se povrchním dojmem a nevšimli si toho, jak v esperantu jsou spojeny prvky románské a germánské v ladný celek. Stejnou výtku mohli by učiniti mnohým evropským národním jazykům, které ovšem jsou v té výhodě, že si tuto směs utvořily „organickým vývojem“, jak praví blýskavá vědecká fráze. Nepředpojatě rozebírejte slovníkově anglické věty: I have visited a part of this land. He has promised to come. It will probably rain. Vedle románských slov: visited, part, promised, probably, vidíte tu germánská: land, come (kommen), rain (regnen). A přece je angličtina „a beautiful language“, třeba samo slovo „beautiful“ se může zdáti pedantovi tak směšným, jako kdyby někdo řekl „schönheitsplenus“. V r u m u n š t i n ě, z níž by latinofilští jazykozpytci politikové nejraději rázem odstranili těch 40 procent slovanských slov, najdete tyto věty (dle Vymazala snadno a rychle): Unde e pivnica vostra? Kde je Váš sklep? Nus vesel, sunt bolnav. Am primit o scrisorea. (Dostal-přijal jsem psaní.) Tata vorbește cu kovačul. (Otec mluví s kovářem.) — Z polštiny a maďarštiny netřeba uváděti příklady podobné, které nejsou pro posměch a jichž možnost není jazyku nijak pohanou. Není dnes čistých plemen na pevninách a je pramálo ryze čistých jazyků. — Všimneme-li si dvou nejstarších jazyků litevského a lotyšského, jak nás na první pohled odpuzuje ta podivná směs sanskritu a prvků anglosaských i slovanských. A přece jsou tyto jazyky neobyčejně bohaté, zvukné a budí obdiv všech lingvistů. Nemohl jsem dlouho překonatí tohoto nepříjemného dojmu, ač jsem byl přec esperantem zbaven podobného předsudku. — Také esperanto je jazyk obsahující různé prvky. A přec je to jazyk krásný a pružný. Zní příjemně a přirozeně z úst mužů i žen na sjezdech a zdá se mi, že jím většinou esperantisté mluví s větší pietou než kterýmkoli jiným jazykem. Nevyvoláváť esperanto nikdy tolik beznaděje u těch, kdo se mu učí, jako těžší národní jazyky, s nimiž nikdy není člověk hotov. Rádné učení se esperantu poskytne užitečného cviku duševního a vytrfíbi mysl mnohem více než jiné vychvalované jazyky, které svým balastem fonetických, morfologických a syntaktických obtíží, nelogických výjimek a výjimek z výjimek i průměrné žáčky omrzí. (—dr—)



PŘÍŠTÍ SVĚTOVÝ KONGRES ESPERANTSKÝ se bude konati podle rozhodnutí Ústředního výboru v srpnu 1924 ve Vídni. Druhým navrženým místem byla Sofia, avšak Bulharský svaz esperantský se dobrovolně zřekl uspořádati kongres, jelikož by toto město nestačilo pojmouti očekávaný velký počet delegátů. Na místo toho se bude konati v Sofii těsně před kongresem světovým sjezd balkánských esperantistů. Ve Vídni byly zahájeny již nyní pilné přípravy; přední tamní herci byli vyzváni, aby převzali role k esperantskému provedení Ifigenie, pro-

jektovanému o kongrese. Pro herce bude uspořádán zvláštní kurs esperanta.

ESPERANTO U SVAZU NÁRODŮ. Ve svém tichém zápasu o uznání získalo esperanto právě nového úspěchu u Svazu národů. Kdežto loňské podzimní zasedání Svazu národů se prohlásilo jasně pro esperanto, doporučila nyní Komise pro duševní spolupráci při S. N. místo esperanta učení jazykům národním. Svaz národů, jenž jednal ve svém shromáždění o této věci, zamítl tuto resoluci a navrhl jí zmíněné komisi. Velký počet delegátů, mezi jinými i lord Robert Cecil, prohlásil, že ona resoluce nemůže býti přijata, jelikož význam esperanta stále vzrůstá. Horlivě se zastali esperanta zejména delegáti států asijských, kteří kladli důraz na velké rozšíření tohoto jazyka ve svých zemích. Jest to nový důležitý úspěch esperanta na mezinárodním fóru, neboť zmíněná resoluce jest jediná, která vůbec kdy byla Komisí pro duševní spolupráci Svazem Národů vrácena. — S. N. zůstává tedy při své zprávě mluvící pro esperanto, jež loni byla oficiálně schválena.

BRAZILSKÝ PARLAMENT JEDNAL O ESPERANTU v nedávném svém zasedání a usnesl se velkou většinou zavést zkoušky z esperanta do škol brazilských. Mnohé tamní oficiální instituce se o to zasazují, aby esperanto urychleně proniklo a používají tohoto jazyka na mnoha stranách ve svých stycích s cizinou. Rozsáhlé Spojené státy brazilské se stávají tak basí esperantské práce v celé jižní Americe.

DÍLA BRATŘÍ ČAPKŮ V ESPERANTSKÉM TISKU. Esperantský list Literatura Mondo, jenž je dnes rozšířen ve všech kulturních zemích, má v jednom z posledních svých čísel podrobný referát o anglickém provedení her RUR a Ze života hmyzu. O obou kusech mluví nadšeně a zajímavé jsou esperantské překlady některých částí podle anglického textu.

TURISTICKÁ LITERATURA ESPERANTSKÁ jest bohatá a důstojně se řadí k turistickému písemnictví i zcela velkých národů. Vyznamenává se početností i obsahem, neboť několik set esperantských průvodců dosud vydaných jest sepsáno vesměs znalci ze země samé, o které spisy jednájí. Velký význam esperanta pro zvýšení cizineckého ruchu uznávají příslušné instituce a péčí ministerstev a turistických svazů v mnoha zemích byly vydány v esperantu cenné edice. V pražské výstavě propagačních pomůcek, jež byla pořádána Ústředím cizineckých svazů a nedávno byla ukončena, bylo viděti v esperantském oddělení nákladné tisky vydané železničním ministerstvem japonským, býv. Rakouska-Uherska, drahami francouzskými a mnoho jiných zajímavých ukázek. V Československu vyšlo již na 30 esperantských průvodců.

MEZINÁRODNÍ JAZYK V BULHARSKÉ ARMÁDĚ. Bulharské ministerstvo války vydalo výnos, podle kterého se dovoluje příslušníkům bulharského vojska, aby i ve službě nosili esperantský odznak. Jest to nový doklad, jak bulharské úřady přejí rychlému rozšíření esperanta v zemi.

ESPERANTO V ITALSKÝCH ŠKOLÁCH. Italské ministerstvo obchodu a průmyslu ohlásilo všem obchodním učelištím podřízeným tomuto ministerstvu, že se povoluje na nich zatím nepovinné vyučování esperantu.

## LA SOLA EN ESPERANTUJO BES-adresaro de Esperantistoj

el ĉiuj landoj

Ĵus aperis en 5-a eldono. Helpe de facile kompreneblaj mallongigoj kaj per registro laŭ okupoj ĉiu facile trovas taŭgan korespondanton! — Ĉiu aĉetinto rajtas je premioj en la prospekto menciitaj. Prezo 6 Kč (1.-Fsv), por landoj malbonvalutaj speciala rabato. — Mendu tuj tiun ĉi unikan broŝureton! — Prospekto senpaga. Bohema Esperanto-Servo, (Ing. Molnár) Praha II., Žitná 44.

## ĈU VIAJ NERVOJ ESTAS MALSANAJ?

ĈU VI NE POVAS DORMI?

Uzu elektrogalvanan aparaton sistemo

„VOLMUT“

havebla kaj videbla ĉe

Ing. B. MOLNÁR

Praha II., Žitná 44 Ĉeĥoslovakujo.

Doplňte si scházející Vám

## SPISY ZAMENHOFOVY

Fundamento de esperanto . . . . .	Kč 3.—
Esenco kaj estonteco de la L. I. teksto franca kaj esp. . . . .	2.—
teksto ĉeĥa . . . . .	2.—
Fundamenta Krestomatio. Dika libro 460 p. . . . .	22.—
Georgo Dandin, komedio en tri aktoj de Molière . . . . .	8.—
Hamleto, tragedio en kvin aktoj de Shakespeare . . . . .	8.—
Ifigenio en Taŭrido, dramo en kvin aktoj de Goethe . . . . .	16.—
Proverbaro esperanta . . . . .	8.—
La Rabistoj, dramo en kvin aktoj de Schiller . . . . .	11.—
La Revizoro, komedio en kvin aktoj de Gogol . . . . .	11.—
Fabeloj de Andersen. Plena kolekto . . . . .	16.—
La Rabeno de Bahara, romano de Heine. La gimnaziano, monologo de Šalom Alaihem . . . . .	8.—

Celá kolekce 110 Kč vyplaceně. Na jednotlivá díla 20 procent exp. výloh a porta. Proti předem zaslánému obnosu. Žádejte složenku. Obstará

ADMINISTRACE PROGRESA Praha-VII. Sochařská 333.

NOVINKA.

PRÁVĚ VYŠLO.

Žádejte u všech knihkupců! Ihned objednejte!

## UČEBNICE ESPERANTA.

Obsahuje podrobnou soustavnou mluvnici, Zamenhofovo Ekzercaro, obsáhlou čítanku s texty Dra Zamenhova a jiných vynikajících Esperantistů a se vzornými překlady vybraných ukázek z české literatury, slovník, rozmluvy a korespondenci se zvláštním zřetelem k potřebám obchodním.

Sepsali a sestavili Dr. G. Žďárský a K. Procházka. Nákladem Jindř. Bačkovského v Praze II. Žitná 55. — Stran 352, form. 16×11, cena Kč 20.—.

Nepostradatelná pomůcka zvláště pro pokročilé esperantisty, vyšší kursy a kruhy obchodní

## TRADUKOJ EL LA ĈEĤA LITERATURO

Arbes J.: <b>Rakontoj.</b> Trad. J. Grňa 135 p. Kč 6.
Novák Arne: <b>Ĉeĥa literaturo</b> el la birda perspektivo. Trad. V. Kroužil 58 p. . . . . Kč 8.
Dr. Novák Jan: <b>Johano Amos Comenius.</b> Trad. Rondeto de esp. Kun antaŭparolo de Dro Kamarýt. 27 p. . . . . Kč 5.
Mahen J.: <b>Koboldo Ondra.</b> Trad. Moraviaj pioniroj. . . . . Kč 5.

5 Kč = 1 sv. fr. Mendu ĉe

ADMINISTRACIO DE PROGRESO Praha-VII. Sochařská 333.

Postulu pagilon de la poŝta ĉekoficejo aŭ sendu monon en rekomendita letero.

## PRO KURSY A KLUBY

opatiĉe si

## SLOVNÍK ESPERANTSKO-ĈESKÝ

od B. Tittla s krátkou mluvnici.

Stran 67.

Brož. za 5 Kč, pěkně vázaný 7.50 Kč. - Při objednávce aspoň 10 exempl. 10% sleva.

ADMINISTRACE PROGRESA

PRAHA VII. SOCHAŘSKÁ 333.

